# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-24 n-ro 426

# Oxfam alarmas pri la kreskado de la neegalecoj en la mondo



Pence certigis al Israelo translokadon de ambasadorejo al Jerusalemo

Abbas vokas membroŝtatojn de EU agnoski palestinan ŝtaton

Poemoj de brazilaj geesperantistoj

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

*Oxfam* alarmas pri la kreskado de la neegalecoj en la mondo
*82% el la produktataj riĉaĵoj en dek du monatoj profitas al 1% el la plej riĉaj p. 03*

Abbas vokas membroŝtatojn de EU agnoski palestinan ŝtaton
*Abbas laŭdis la EU kiel "veran partneron kaj amikon" p. 04*

Pence certigis al Israelo translokadon de ambasadorejo al Jerusalemo
*Antaŭ la fino de la venonta jaro p. 05*

Sportŝuo utilas kiel publiktransporta bileto
*Je 10 linioj de la subtera fervojo, 22 de tramoj kaj pli ol 150 de aŭtobusoj p. 05*

Mondaj Rekordoj de Guinness atendas atesti pli da fieraĵoj de Ĉinio
*Programo "Fiera Ĉinio" p. 06*

Socia Darvinismo: konsekvencoj de grandskala miskompreno
*Radikalaj kaj nepruvitaj asertoj p. 07*

Hodiaŭe
*E. T. A. Hoffmann; Edith Wharton; kaj Vicki Baum p. 08*

Alvoko al partopreno en la Esperantologia Konferenco, Lisbono 2018
*La aranĝo havas kiel specialan temon la vivon kaj verkaron de Detlev Blanke p. 09*

Raporto pri la KER-ekzamenoj en 2017
*2017 estis laŭkalendare la deka ekzamenjaro en kies fino ni atingis sume 2012 sukcesintojn p. 09*

Poemoj de brazilaj geesperantistoj
*Paulo Sérgio Viana; Nazaré Laroca; kaj Paulo Nascentes p. 10*



# *Oxfam* alarmas pri la kreskado de la neegalecoj en la mondo

Tiu ŝoka raporto celas atentigi la ĉefajn ekonomiajn kaj politikajn decidantojn pri la neegalecoj en la mondo. Kiel ĉiujare, antaŭ la Monda ekonomia forumo en Davoso, kiu kunigas en malgranda skistacio de la Svislandaj Alpoj la aferistojn kaj la precipajn estrojn de la planedo, la NRO *Oxfam* starigas inventaron. Ĝi konkludas, ke la neegalecoj denove kreskis en 2017: 82% el la produktataj riĉaĵoj en dek du monatoj profitas al 1% el la plej riĉaj.

La riĉuloj neniam estis tiel riĉaj, gurdas "*Oxfam*", kiu asertas, ke pasintjare la nombro de miliarduloj spertis la plej fortan kreskon de ĝia historio. Ni konsciiĝu, ke nova miliardulo naskiĝas ĉiun duan tagon, kaj ke la ĝeneralaj riĉaĵoj kreskas je 762 miliardoj da dolaroj en dek du monatoj.

Tiu rekordo, maldeca, laŭ la NRO, memorigas, ke tiu sumo estas sepoble pli alta ol tiu, kiu ebligus meti finon al la ekstrema malriĉeco en la mondo.

Dum la ekonomio fartas pli bone – laŭ la grandaj financaj centroj, kiuj atestas pri reveno de la kreskado kaj de la ekonomiaj rekordoj – "*Oxfam*" timas, ke tiu plibonfarto koncernas nur malplimulton.

Estas tempo, asertas la NRO, lukti kontraŭ la neegalecoj tie, kie la riĉaĵoj kreiĝas, t.e en la entreprenoj. Kaj Davoso estas la plej taŭga loko por liveri tiun mesaĝon, ĉar ĉi tie kolektiĝas la direktoroj de la mil plej grandaj entreprenoj de la planedo, kies ĝenerala vendosumo proksimiĝas je 25 miliardoj da dolaroj. Tamen, nenio indikas, ke tia mesaĝo estos aŭdebla en tiu kapitalisma sanktejo.

Neniam Milito Inter Ni



# ABBAS vokas membroŝtatojn de EU agnoski palestinan ŝtaton

Lunde [22 jan 2018] en Bruselo vizitanta palestina prezidento Mahmoud ABBAS alvokis la membroŝtatojn de la Eŭropa Unio rapide agnoski la Palestinan ŝtaton, meze de internacia bruego kaŭzita de la usona agnosko de Jerusalemo kiel la ĉefurbo de Israelo.

ABBAS faris la rimarkojn antaŭ neformala lunĉo kun ministroj pri eksterlandaj aferoj el membroŝtatoj de la EU kaj supera reprezentanto de la EU pri eksteraj aferoj kaj politika sekureco Federica MOGHERINI en la intertempo de la ĉiumonata kunveno pri eksterlandaj aferoj de la unio.

ABBAS laŭdis la EU kiel "veran partneron kaj amikon". Li provis konvinki la blokon, ke ne estas kontraŭdiro inter la agnosko (de la Palestina ŝtato) kaj la rekomenco de intertraktado.

ABBAS diris, ke la EU kontribuis kaj kontribuas al la konstruado de la Palestina ŝtato kaj ĝiaj institucioj per financaj kaj ekonomiaj subtenoj.

La EU lasis al siaj membroŝtatoj la demandon, ĉu ili agnosku la Palestinan ŝtaton, kaj la plejparto de ili ŝanceliĝis pri la decido.

Pri la streĉeco kun Israelo, ABBAS akcentis, ke palestinanoj restos fidelaj al la traktatoj, kiujn ili subskribis kun Israelo, kaj ankaŭ Israelo devas fari la samon.

La vizito de ABBAS al Bruselo koincidis kun la vojaĝo de usona vicprezidento Mike PENCE al Israelo, kiu estas la tria stacio de lia kvin-taga vojaĝo al Mez-Oriento ekde vendredo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# PENCE certigis al Israelo translokadon de ambasadorejo al Jerusalemo

Usona Vicprezidento Mike PENCE lunde [22 jan 2018] faris paroladon al la Israela parlamento, promesante, ke la debatinda translokado de la Usona ambasadorejo el Tel-Avivo al Jerusalemo estos finita en malpli ol du jaroj.




PENCE diris en sia parolado, ke Jerusalemo estas la ĉefurbo de Israelo, kaj tial usona prezidento Donald TRUMP ordonis la Ŝtatan Departementon [Ministerion pri Eksterlandaj Aferoj] tuj komenci la procezon de translokado de la ambasadorejo el Tel-Avivo al Jerusalemo. Li diris, ke en la venontaj kelkaj semajnoj la Usona registaro antaŭenigos la planon pri la translokado, kaj la ambasadorejo en Jerusalemo estos malfermita antaŭ la fino de la venonta jaro. Tamen li akcentis, ke Usono ankoraŭ klopodos plu por realigi longedaŭran pacon inter Israelo kaj Palestino.

La parolado de PENCE estigis proteston de arabdevenaj membroj de la Israela parlamento. Ili alte levis sloganon "Jerusalemo estas la ĉefurbo de Palestino". En la lasta monato Usona Prezidento TRUMP anoncis agnoski Jerusalemon kiel la ĉefurbon de Israelo kaj ordonis transloki la ambsadorejon al Jerusalemo. Tiu decido tuj estigis fortajn protestojn de palestinanoj, kaj pro tio Usono kelkfoje prokrastis la planitan decembran viziton de PENCE al Mez-Oriento.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Sportŝuo utilas kiel publiktransporta bileto

Pasintsemajne kadre de festado de sia 90-jariĝo la entrepreno de transporto de Berlino “BVG”, pere de du vendejoj de la urbo, kaj partnere kun la fabrikanto “Adidas”, surmerkatigis 500 parojn da sportŝuoj kun sama bildo de tiu sur sidlokoj de la berlina subtera fervojo.




Tamen novigas, ke daŭre de unu jaro tiu sportŝuo validas kiel publiktransporta bileto je 10 linioj de la subtera fervojo, 22 de tramoj kaj pli ol 150 de aŭtobusoj. La bileto konsistas el brodaĵoj sur la langeto de la sportŝuo.

Rimarkinde estas, ke la porjara bileto kostas inter 728 kaj 761 eŭrojn, kaj la prezo de tiu sportŝuo estas nur po 180 eŭrojn por paro. La afero tiom sukcesis, ke multaj homoj de tri tagoj antaŭ la ekvendado enviciĝis ĉe la vendejoj, malgraŭ la malvarmo.

Laŭ iu proparolanto de BVG, tiu projekto celas la junularon, allogante novajn uzantojn al publiktransporto kaj eble ankaŭ novajn dungotojn.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# Mondaj Rekordoj de Guinness atendas atesti pli da fieraĵoj de Ĉinio

En 1955 aperis la unua eldono de Mondaj Rekordoj de Guinness. Ekde tiam Mondaj Rekordoj de Guinness, aŭtoritata organizo pri atesto de diversaj mondaj rekordoj, atestis multe da brilaj, interesaj aŭ kuriozaj mondaj rekordoj, kaj samtempe ĝi silente registris diversajn atingojn en la disvolva procezo de la homaro.




"En nia datenbanko kolektiĝis pli ol 50 mil mondaj rekordoj. Ĉiujare ni ricevas ĉirkaŭ 47 mil petojn pri Mondaj Rekordoj de Guinness, ĉirkaŭ mil ĉiusemajne. Ĉiujare petoj el Ĉinio kalkuliĝas al 1 500, inter kiuj ĉirkaŭ 300 estas aprobitaj," Alistair Richards, tutgloba prezidanto de Mondaj Rekordoj de Guinness, diris dum intervjuo al *Xinhua*-a Novaĵ-agentejo [新华社 xīnhuáshè]: "En 2012 ni malfermis oficejon en Pekino por kuraĝigi pli multajn ĉinojn peti la Mondajn Rekordojn de Guinness. Ni decidis kolekti pli da rekordoj de Ĉinio kaj atendas atesti pli da fieraĵoj de la lando."

Alistair Richards diskonigis, ke la ideo pri starigo de Mondaj Rekordoj de Guinness originas el la diskuto "kiu specio de eŭropaj birdoj flugas plej rapide" en iu renkontiĝo okazinta en Irlando en 1953. Poste Sir Hugh Beaver, gastiginto de la renkontiĝo, petis la ĝemelajn fratojn Norris McWhirter kaj Ross McWhirter verki libron pri faktoj kaj donitaĵoj, kaj sekve la monde unua Mondaj Rekordoj de Guinness estis eldonita post du jaroj.


Ĝis nun Mondaj Rekordoj de Guinness estis vendita entute je 138 milionoj da ekzempleroj kaj ĝi iam estis la libro kun plej granda vend-kvanto. "Tamen tiu rekordo estis superita de ĉina *Xinhua*-Vortaro, kiu estis vendita je 567 milionoj da ekzempleroj, ekde sia eldono en 1953 ĝis julio 2015, kaj fariĝis 'la plej ŝatata vortaro' kaj 'la plej bone vendita libro' (regule reviziata) en la Mondaj Rekordoj de Guinness. Preskaŭ ĉiu ĉina familio havas unu ekzempleron de tiu vortaro. Mi opinias, ke tiu vortaro daŭre tenos la mondan rekordon en la venontaj multaj jaroj", diris Alistair Richards.

Richards diris ankaŭ, ke Mondaj Rekordoj de Guinness planas la programon "Fiera Ĉinio". "Per tio ni povas trovi, atesti, celebri kaj montri mondajn rekordojn de Ĉinio, kiuj povas prezenti historion, kulturon, altajn kaj novajn teknikojn de la lando. Ekzemple, la komput-tabelo el bambuaj tabuletoj en la periodo Militantaj Regnoj (475 a.K.-221 a.K.), kolektita de *Tsinghua*-Universitato kaj atestita kiel la plej frua 'decimala multiplika tabelo', estis inventita antaŭ 2 300 jaroj kaj rigardata kiel la plej frua embrio de komputilo. Tiu ekzemplo montris, ke 'Fiera Ĉinio' ne nur diskonigos al ĉinaj legantoj similajn surprizajn teknikojn, sed ankaŭ prezentos al la tuta mondo instigajn rakontojn pri delikataj kulturo kaj historio de Ĉinio. Ni esperas, ke Ĉinio festos siajn historion, kulturon kaj scienc-teknikan progreson, kaj diskonigos tiujn rakontojn al la tuta mondo."

Niu Xueqin
El Popola Ĉinio

# Socia Darvinismo: konsekvencoj de grandskala miskompreno

Kiam oni parolas pri Darwin, nia menso direktiĝas al evoluismo. Malgraŭ la ideo pri la ŝanĝo de la specioj – almenaŭ ties formoj – dum tempo jam ekzistis delonge antaŭ Darwin, lia propono diferenciĝas de la aliaj pro la mekanismo kiu estas la bazo de tiu evoluado: natura selektado.



Post ĉirkaŭmonda vojaĝo surborde de la angla ŝipo *Beagle*, kaj kolektinte diversajn specimenojn de preskaŭ ĉiuj kontinentoj, Charles Darwin elspezis jardekojn por analizi, priskribi, observi kaj dedukti la kaŭzojn de tiuj ŝanĝoj. Influite de la sciencisto Thomas Malthus, li elpensis manieron per kiu la specioj ekaperas en la mondo: la natura selektado.

Se ni povus resumi la koncepton (ja malfacila tasko, preskaŭ ne kontentige plenumebla), la kvanto da individuoj kiuj naskiĝas, en iu ajn scpecio, estas multe pli granda ol la kvanto de manĝaĵo, spaco kaj reproduktiĝ-oportunecoj disponeblaj en la medio. Kompreneble, ne ĉiuj sukcesos vivi por plenumi sian biologian taskon. Sed kiu elektiĝas por havi aliron al tio? Darwin proponis, ke la konkurenco inter la individuoj "selektas" la plej fortan aŭ adaptitan por ekhavi al si la rajton kreski kaj reproduktiĝi. Malgrandaj morfologiaj, anatomiaj, kondutaj, kemiaj ŝanĝoj povas helpi aŭ malhelpi la individuon atingi tiun celon. Kaj tiuj individuaj ŝanĝoj ofte okazas hazarde, per genetikaj bazoj.

La teorio estis atakata ĉiuflanke kaj ricevis diversajn akrajn kritikojn. Preskaŭ perdiĝis, fakte. Tamen, ĝi inspiris homojn pensi ke, se ĝi funkcias kaj ekzistas, certe ne limiĝas al la sovaĝa mondo de la bestoj kaj plantoj. Ĉu la brutala leĝo de natura selektado ankaŭ valoras al la homa specio? Kelkaj intelektuloj pensis pri tio, kaj estis la komenco de unu el la plej polemikaj kaj malbonaj miskomprenoj de scienca teorio en la moderna okcidenta mondo.

Kvankam la esprimo ekaperis unuafoje en 1877, per la plumoj de Joseph Fisher, aliaj eminentuloj prenis la torĉon kaj propagandadis la ideon, kiel Thomas Malthus, Herbert Spencer kaj Francis Galton. Kun la forta ideo pri la certeco de natura selektado kiel natura leĝo, kelkaj homoj pensis, ke la sociaj malegalecoj kiuj troviĝas en ĉiuj landoj ne estas pro politikaj mispaŝoj, sed estas natura konsekvenco de la biologia leĝo. La fakto ke kelkaj homoj prosperas dum aliaj mizeras ne plu estas la rezultoj de politika agado, sed natura afero mem, kaj tio ne estas kontraŭbatalinda. Riĉaj, belaj kaj sanaj homoj devas prosperi ĉiam, dum la ne "adaptitaj" devas alfronti sian destinon. Ligoj de socia darvinismo kun kapitalismo estis preskaŭ neevitebla de la socio, kaj ofte komfuziĝas multfoje. Multaj trovis en tiu aserto justan kialon por klarigi socian malegalecon, kaj tio estis sufiĉa por instigi kruelan konduton kaj tutan malinteresiĝemon al mizeruloj.


Se tio ja ne estus sufiĉe granda konfuziĝo kaj tordita vidpunkto kun gravaj konsekevencoj, la klimakso alvenis poste, kiam oni ekdiskutis la rajton elimini de la homa specio la individuojn kiuj ne kontribuas al la bonfarto de la homa societo kaj nur konservi tiujn kiujn portu al nia specio altkvalitajn karakterojn. Estis la naskiĝo de eŭgeniko.

Eŭgeniko provas plibonigi la heredajn trajton per ĉiuj disponeblaj metodoj. Sur baza malmorala fundamento, ĝi estas pseŭdoscienco kiu surprizige disvastiĝis en la mondo. Diversaj gravaj landoj subtenis la ideon kaj kreis publikan politikan

sistemon por senutiligi homojn kiuj portas maldezirindajn trajtojn. Landoj kiel Usono, Japanio, Germanio kaj Ĉinio adoptis politikan planon por steriligi handikapulojn kaj mensmalsanulojn. La terureco de tiu politiko kulminis en la amasmurdo en ekstermejoj dum la Dua Mondmilito.

Feliĉe, post tiu fazo, eŭgeniko perdis sian forton kaj iom post iom troviĝis sian lokon en la abomenintaj sciencaj teorioj jam kreitaj. Socia darvinismo ankoraŭ ekzistas kiel ideo, sed ĝi iom post iom fariĝas pli kaj pli malpopulara en la societo. Espereble, ĝi ne retrovu forton en la nuntempo, kie radikalaj kaj nepruvitaj asertoj ŝajne reprenas iom da spiro.

Wendel Pontes
ISAE



## E. T. A. Hoffmann

**Ernst Theodor Amadeus Hoffmann [ernst TEodor amaDEus HOFman] (naskiĝis la 24-an de januaro 1776 en *Königsberg*, mortis la 25-an de junio 1822 en Berlino) estis germana verkisto, desegnisto, komponisto kaj juristo.**

**En Esperanto aperis: *Fraŭlino de Scudery: rakonto el la epoko de Luizo dek-kvara; Konsilisto Krespel: Novelo.***

**Vikipedio**

## Edith Wharton



**Edith Wharton (l-dit ŬAR-ton), aŭ origine Edith Newbold Jones (naskiĝis la 24-an de januaro 1862 en Novjorko, mortis la 11-an de aŭgusto 1937 en *St.-Brice-sous-Forêt*, Francio) estis usona verkistino.**

**En Esperanto aperis: *Aliaj Tempoj*.**

**Vikipedio**



## Vicki Baum

**Vicki Baum [viki baŭm], aŭ plennome: Hedwig Baum (* la 24-a de januaro 1888, † la 29-a de aŭgusto 1960) estis juda verkistino.**

**En Esperanto aperis: *Amo kaj morto en Balio*.**

**Vikipedio**

# Alvoko al partopreno en la Esperantologia Konferenco, Lisbono 2018




La organizantoj de la Esperantologia Konferenco 2018 okazonta en Lisbono, Portugalio, kadre de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto alvokas ĉiujn fakulojn, sciencistojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la Esperantologia Konferenco 2018, sub la aŭspicio de Universala Esperanto Asocio (UEA) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

La aranĝo havas kiel specialan temon la vivon kaj verkaron de Detlev Blanke (1941-2016), unu el la fondintoj de la tradicio de Esperantologiaj konferencoj kaj elstara aganto por la evoluigo de Esperantologio dum la lastaj kvardek jaroj.

La konferenco okazos en du partoj: dum la matena sesio oni planas aŭskulti prelegojn de fakuloj kunlaborintaj kun Detlev Blanke, aŭ dezirantaj omaĝi al lia memoro. Ili elstarigos la diversajn kontribuojn de Detlev al lingvoscienco kaj al Esperanto kaj lian eksterordinaran eldonan kaj verkan agadon.

En la dua duono la partoprenantoj denove havos la ŝancon prezenti sian laboron pri plej diversaj kampoj de Esperantologio. La kontribuoj de tiu parto estos prezentitaj ĉu en afiŝoj ĉu per normalaj mallongaj referaĵoj. La organizantoj invitas ĉiujn fakulojn, aparte gejunulojn kaj unuafojajn partoprenantojn, sendi afiŝproponojn aŭ proponojn pri referaĵoj kiel eble plej baldaŭ al `ek@kulturo.net`. La limdato por la proponoj estos 2018-04-30.

Gazetara Komuniko de UEA, n-ro 721

---

# Raporto pri la KER-ekzamenoj en 2017

2017 estis laŭkalendare la deka ekzamenjaro en kies fino ni atingis sume 2012 sukcesintojn.

En la 10-a kalendarjaro de la KER-ekzamenoj okazis entute 5 memstaraj ekzamensesioj en kvar landoj. Ni organizis la 6-an tutmondan ekzamensesion en du partoj (la 10-an kaj la 17-an de junio) en 18 urboj de 14 landoj. En tiuj urboj ekzameniĝis entute 117 personoj kaj sukcesis 99.

Poste ni havis apartan sesion dum la hispana landa kongreso en *Teruel*. Komence de julio okazis paralelaj sesioj en la usona urbo *Raleigh*, dum la landa kongreso kaj en *Herzberg*, Germanio. En julio ni okazigis plian sesion, same en *Raleigh*, dum la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) kaj la lasta sesio estis dum UK en Seulo.

Al la ekzamenoj dum la jaro aliĝis entute 197 personoj, aperis en la ekzamenlokoj 181 kandidatoj (92 %) el kiuj sukcesis 161 personoj (89 %). La nombro de la fiaskintoj estis 20 (11 %).

La plej sukcesa lando ĉi-jare estis Usono, kie ekzameniĝis kaj sukcesis entute 24 personoj. La sekva plej diligenta lando estis Francio, kie entute en 3 urboj estis sesio, kaj aldone francoj ekzameniĝis ankaŭ en Svislando kaj Koreio, entute 18 personoj. Estas interese mencii ke kun la ĉi-jaraj ekzamenoj Francio entute nun atingis 504 diplomitojn.

edukado.net

# Poemoj de brazilaj geesperantistoj

En mezlernejoj la lernantoj ricevas informojn pri la literaturo (inkluzive de poezio) de la gepatra lingvo kaj eble ankaŭ de lernata fremdlingvo, sed - kiel okazas kun aliaj lernfakoj – ne ĉiuj lernejanoj ŝatas literaturon, same kiel multaj ne ŝatas matematikon aŭ historion ktp.




Kiam oni volas lerni kaj studi fremdajn lingvojn en la universitatoj, oni necese – aŭ almenaŭ ordinare – devas studi la literaturon de tiuj lingvoj, eĉ se oni intencas preni profesion malproksiman de literaturo. Do kiam mi studis la anglan kaj la francan, mi ankaŭ studis iliajn literaturojn. En la franca literaturo mi interesiĝis pli pri malnovaj verkistoj (ĝis la 19-a jarcento, ekzemple mi ŝatis BAUDELAIRE (vidu mian artikolon de la 1-a de novembro de 2016), sed en la angla – pro influo de profesoro – pli pri la verkistoj de la 20-a jarcento. (Vidu mian artikolon de la 18-a de oktobro 2016 pri Kenneth WHITE.)

Post kiam mi alvenis al Brazilo, mia vivo prenis alian direkton (precipe ĉar mi bezonis labori multe por subteni mian familion) kaj mi malproksimiĝis de la literaturo.

Nun – dediĉinte min al Esperanto ekde 2014 – mi iomete revenis al la poezia kampo (ne kiel aŭtoro, sed kiel leganto), ĉar kelkaj brazilaj geesperantistoj publikigas - aŭ diskonigas - siajn poemojn en la interreto. Mi ne scias, kiom ili estas, sed mi konas tri. Ĉiuj tri havas blogon en kiuj oni povas legi iliajn poemojn (kaj kelkfoje prozaĵetojn).

Serĉante en Guglo pri aliaj brazilaj esperantistoj kiuj verkis poemojn, mi vidis en la vikipedia artikolo “Nuna Esperanto-movado en Brazilo” la nomojn de kelkaj “elstaraj verkistoj, poetoj kaj tradukistoj”, sed nur tre malmultaj ŝajnas esti skribintaj poemojn, inter ili ĉefe Geraldo MATTOS.

Kiuj estas la tri geesperantistoj kiuj diskonigas siajn poemojn en siaj blogoj?

Unu el ili estas nia kara kunlaboranto en la Esperanta Retradio Paulo Sérgio VIANA (vidu lia blogo). (Cetere nur nun mi eksciis – en la vikipedia artikolo “Brazila Literaturo en Esperanto” – kiom da romanoj, rakontoj kaj poemoj li tradukis en Esperanton.)

Alia estas la poetino Nazaré (aŭ Maria Nazaré) LAROCA (vidu la blogo). Ĉi-jare estis publikigita ŝia libro *Birda Grundo*, konsistanta el dulingvaj poemoj.

La tria estas Paulo NASCENTES (vodu la blogo). Kvankam vi mem povas legi iliajn poemojn en iliaj blogoj, mi prezentas ĉi-tie po unu aŭ du de ili.

Evidente estus pli bone, se la aŭtoroj deklamus siajn poemojn.

Paulo Sérgio VIANA

### ***Mateniĝo***

*Vekiĝu antaŭ la tagiĝo.*
*Iru vidi la unuan sunradion.*
*Lasu, ke via pupilo malfermiĝu,*
*Surprizita de la origina lumo.*
*La helo.*
*Lumas treme folioj de arbusto,*
*petaloj,*
*la roso.*
*Birdoj pafas sagojn,*
*la aero pulsas.*
*Vi vidas la naskiĝon de la mondo.*
*Kiel feton,*
*la unuan pluvon de la sezono,*
*pupon, ranidon,*
*unuan krion.*
*Sed ne kriu.*
*Silentu, solene,*
*antaŭ tiu sceno,*
*kiun vi privilegie ĉeestas.*
*Vi ne plu vidos egalan mateniĝon.*
*Ĝi estas unika.*
*Atentu.*
*Spiru profunde.*

Nazaré LAROCA

### ***Somere***

*Surstrandas*
*duonnudaj korpoj,*
*kiel ludantaj infanoj.*

*Jen glor' al vivo*
*de provizoraj*
*anonimuloj!*

*Poezio ĉeestas,*
*kaj plaĝo ŝajnigas*
*homaranan egalecon.*

### ***Tago de l' Negra Konscienco***

*Imite al Nietzsche, malhumanas,*
*tro malhumanas, sklaviganta homo*
*ekde l' prahistoriaj tempoj*
*de la krudfreneza homaro.*

*Nin hontigas sklavig', kaj ĝi*
*Brazilon fratan humiligas.*
*Ĉu kompensas pardonpeti?*

Paulo NASCENTES

### ***Gustumado***

*mi ĝuas la nuancon lignece mildan*
*de l' citrata poezio*
*kiu antaŭas l' antaŭgustomun likvan*
*de l' vino – fruktogustaj taninoj –*
*ĉerizogusta*
*aromoj de l' amatin' rubena lumo ruĝa*

*la deveno emfazita de servitaj vortoj*
*sorbitaj dum l' aroma rito*
*de l' antaŭgustumo, kiu ekscitas*
*la mildan fluidan guston de voluptoj*

*prigeografia lekciono poezia*
*kvazaŭ antaŭfaroj antaŭas*
*l' efluvon de la antaŭkiso*
*mildoplena*

*nur tiam l' ardige droninta*
*hebeteca mergiĝo*
*divenita de l' diluvioj*
*avidaj vagantaj atavismoj*

Herbert A. WELKER
Esperanta Retradio